PENSEO

N-ro 279

jan. / 2015

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 26-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Anteo (Ĉinujo)



kaprica vetero

jen ploras jen ridas
vetero nekaptebla kiel virineto ĉiam verda.
ie fajras; ie neĝas.
terure, ke ŝi tikle knedas la terglobon
  regoperda.



2012.11. 4 - 9

geheroj

rajdante sur ĉevalo kongestita,
virŝafo jen estas ĉasata de ŝtormo.
aglino misilas tirante la kapon de fulmo,
kies voston prenas mi sur la cunamo invitita.

2012.11. 5 - 8

kutimoj

virpavoj per plumaro kolorŝuta
allogas la inseksajn aŭ timigas malamikojn.
stelulinoj razas la korpon nuda
kaj inkandeske tantaligas jukajn geokulojn.



2012.11. 6 - 4

ia kredo

adepto en la antaŭa vivo
venis kun dogmoj en la buŝo al ĉi mondo
  besta.
piulo aliveste vivas tage for de karno kaj
  viando
por iĝi homo en la venonta.

2012.11. 7 - 14

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Poeto

Mi ne scias, kial mi kantas.
Pro vivo nekompleta
estas mi eterna infan',
jen ĝoja jen trista,
kiu ludas poeton.

Juiz de Fora, 12/10/2014

La haŭto, kiu en mi loĝas

Mi kantas la memoron
de l' haŭto, kiu en mi loĝas:
la mantelon, kiu min ŝirmas
kontraŭ eksteraj damaĝoj;

Epidermon, teksaĵon,
kiun tempo plugas
per sulkoj,
sekretaj skrapoj

el l' animo,
neforviŝeblaj, do.

Jen ridoj, odoroj
perditaj el infanaĝo
sur la dimanĉa portreto:
patro, patrino
kaj gefratoj etaj.

Ho! Infana
haŭto:
sepjaraĝa...

Tamen finfine
ne malfruas
por ke mi aŭdu

Ĝian krion ribelan,
kiu kontraŭ mi
min protektas.

Juiz de Fora, 19/10/2014

Atomo

Kiam mi pripensas rokon,
mi vidas doloron,
kiu ekde ĉiam
la maleolon ornamas.

Kiam mi pripensas fajron,
la korpon mi sentas
kiel fraktojn el nubo;
lumgrajn' mi estas:
kaj mortos neniam.

Juiz de Fora, 11/11/2014

Paŭlo Silas (Brazilo)



MALBONFARTAS

Mil radoj cirkloiras en grandspaca cerbo.
Tri hormontrilojn mastras ŝtonepokaj vivoj.
Senŝeligil' malakra pro larmveka cepo.
Kaj kial naŭzkaŭzante serpentumas vi, voj'?

Fornfaŭkoj malfermiĝas por engluti febrojn.
Ĉu povas decidhore, lastminute, eroj
En perdon kuntiriĝi ĉirkaŭ fandopunktoj?
Al mort' proksimiĝanta la vivoportun' troi?

Sciig' elglitas el sub marplanktona planko.
Pasio konfuziĝas en la malvarmsango.
La akvofluo-forto fanatikigas saĝon.

Rideto hieneca: ĉu indikas plaĉon?
Blankarda sceptropinto vundmakulas belon.
Malsato sociuma. Nutraĵplena kelo.



SUR ŜTONO, RAŬPECAJ VORTOJ

Disde ĉiuj landolimoj difinitaj
Oni kuris kaŝintence,
Sed kliniĝis riverence
Sokle de statu' de nobla homkvalit' kaj


Multe da promesoj skribis sur granitaj
Homfiguroj, eĉ se dense
Fluis la real' elpense.
Jen promes' sur ŝton', moraldev' sen
hezit-rajt'.

Kiu sekvos la mesaĝon gravuritan?
Tiu, kiu ĝin gravuris, malkomprenas
Formon, kiu vestas ujon krizalidan.

Raŭp' en voj' linia sin mem daŭre tenas.
Tial planon nur promesu ĝustatempe.
Mola raŭpo sin restigu plu surventre.



Mori (Usono)



Saluton al Dio, kiu estas proksime!

Saluton al Dio
en l' flugiloj de l' bridoj
en l' aero,
kaj en la koro de l' arbo-semoj
en la tero,
ANONIME,

saluton al Dio,
kun kiu, kiel fiŝ' kaj akvo,
oni rilatas
INTIME,

saluton al Dio,
kun kiu, kiel papilio,
infanoj ludas
SENTIME,

saluton al Dio
NE tiu gigantulo en granda kastelo,
en la fora ĉielo,
kun paradiz' kaj infero,
sed tiu en ĉies koro,
ANIME,

saluton al Dio,
kiu ŝanĝeblas kun la viv' ,
SINONIME,

saluton al Dio,
kiu ĉie kaj ĉiam,
troviĝas tuj
PROKSIME!

**

Jes, saluton al Dio, kiu estas proksime!

12/15/2014

Aforisme (2)

Tio, kion vi sentas,
pensas,
kaj diras pri tiu aŭ alia ulo
estas "vi mem" en ilia
SPEGULO!

**

Mi preferas malamikon
al amiko
kies amikeco
estas politiko!

**

Kie estas justo,
libero,
prospero.
tie estas ja paradizo
sur la tero

**

Kie la reganto estas
reprezentanto de Dio
tie la civitanoj suferas
en la dia infero.

**

je l' nomo de Dio
Interthoma batalo
Jen la elpensaĵo de
Diablo!

**

Tiu, kiu vivas
laux l' leĝoj de naturo ,
estas vere libera,
tiu, kiu vivas
en la skatolo de l' kulturo
estas malliberulo vera!

**

Zorgu ke via kulturo
Ne estu muro
Inter vi kaj via naturo!

**

Jes ja , Esperanto estas
la bela lingvo de amikeco
kaj paco,

Sed inter tio kaj ni " esperantistoj"
grandas ja, la distanco!

**

Dio
estas en ĉio,
Ĉio
estas en Dio
kaj vi , parto de tio!
Vi, do, estas Dio!

Korektado

En kanzonteksto “Samkiel blanka papero” de penseo 278, Shoreh Aghdashloo estas aktorino, sed ne la kantistino de la kanzono. La kantistino de la kanzono estas Shoreh Solati.

La redakcio

Cezar (Germanujo)



Je l'nova jaro!

Je via san' dum nova jar'!
Ni tostu do laŭ ge' aŭ par'.
Prosperu, kara, sed kun dec'.
Bonŝancu dum eternec'.
Printemp' jubilu post la frid'.
En verd' tulipoj floru kun fid'.
Je via san'!

Spure

Sur de mi farita spur'
restis mi persone nur.
Perdis sin junula aspir';
mi estas nun tre sobra laŭ dir'.

Volis plugi spuron mi laŭ vir'.
Kun pasio kaj granda inspir'.
Volis krei mi titanan nur,
sed hom' nur estas sur sola spur'.

Siv Burell (Svedujo)



Pli bone en malnovaj tempoj-aŭ?

Ĉu logas vin tempo forgesita,
kiam portistoj liveris poŝt’ ĉe pord’,
kiam acida lakto, hejme farita,
staris sur la matena tablo en ord’,
kiam venis biero per kamion’
kaj dimanĉe laŭ tradicion’
post preĝeja vizito
la parencoj venis sen invito.




ilustraĵo de la aŭtorino

Infanoj longe restis infanoj,
sed lernis kunhelpi:
kirli porkosangon, fiŝkapti,
fari akvujon al porkido,
nodi ŝuojn al pli juna ido,
pluki fungojn kaj berojn
kaj sperte fari monaferojn.

Malgraŭ maŝinoj por lavado,
kuireja roboto, frostoŝranko,
ni tragike parolas pri manko
de tempo por interrilato
kaj homa kompato,
tro multe da postuloj!
Kiel la kondiĉoj ŝanĝiĝis tiel
mi komprenas neniel.

Sed ĉiu nun pli decidas pri sia sorto,
homo, ne familio, agas laŭ sia forto.

Lesja Ukrainka (1871-1913)



KANTOJ EL TOMBEJO

***

Sur la tombejo mi kuŝis en ombro,
kantis ĉirkaŭe silento entomba,
kantis: “Ekdormu! – entomba silent’. -
Sonĝu feliĉon sen pen’.”

Dormi? Ho, dormas la beb’ en lulkorbo,
dormas mortinto trankvile en tombo,
se nemortinto troviĝas en tomb’,
ĉu tio estas la dorm’?..

***

Sur la tombejo pri feliĉo ni parolis,
kaj falis vortoj, kaj animon kovris
sinceraj vortoj kvazaŭ foliar’…

Kaj ŝanceliĝis en malgaj’ herbar’,
kaj ŝajne ĉiuj tomboj kaŝi volis,
ke tiam pri feliĉ’ malkaŝe ni parolis...

30.IV.1905

Tradukis el ukraina lingvo



Petro Palivoda (Ukrainujo)

Luís Vaz de Kamoens (ĉ.1524-1480)




Am'estas fajr' ardanta

Am’ estas fajr’ ardanta ne vidata,
vundego kiu tute ne turmentas,
kontento eĉ se ĝin ni malkonsentas,
doloro el freneziĝo tre glata.


Al senestim’, ol male, pli rilata,
am' solecas dum homojn ĝi frekventas,
el kontent' am' ne sufiĉe kontentas,
por ĝi gajn' estas ĉio ajn perdata.

Am' estas iĝi subkatene vole,
estas, venkinte, servi al venkito
kaj, venkate, al venkant’ emi mole.

Nu kiel povus, fakte, am', sen spito,
al homa kor' rilati ĝismedole
se mem kontraŭas sin ĝis l' infinito?



Elportugaligis



Ŭel Roŝa (Brazilo)

Ali Podrimja (1942-2013)



Kanto

Ne ĉiam vi kantas por iĝi kanto
neniam vi elkantos vin ĝis la fino
ho peza muziko
Vi ne elkantos vin tuta ĉar via fino
estas la senfina mondofino
longa mortado de homo

Venis la homo

La unuan tagon
Dio kreis Radon
kaj al la Homo disrompis la kapon
poste

Li kreis Seĝon kaj Tranĉilon
poste
Najlon Ĉielon
kaj Azenon vivan
poste
Sangon kaj Akvon
poste
Dormon kaj Pluvon
La sesan tagon
Dio diris
mortigu
ili mortigos vin
poste
venis la Homo
ĉio komenciĝis denove

La metaforo de mia vivo

Se mi silentas
al mia vivo mankas kvieto
vorto estu ĉiam kun mi

la silento
ne ŝanĝos vin
al muelŝtono

se mi silentas
al mia vivo mankas kvieto
vorto estu ĉiam kun mi

mia vundo
spiradu
plenbruste



Revenu al la poezio de Homero

revenu al la poezio de Homero
revenue tien de kie vi alvenis
tio ne estas via tempo revenu
liberigu vin de homoj
ombrojn liberigu de la masko
forkurojn de sendormeco
silenton de febro
kaj pluvon tio ne estas via tempo
revenu al la poezio de Homero
io falis kaj Marseljezon
jam delonge kantas neniu

Esperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO UNUA

Feliĉa vagado en absoluta libero

§01-02

Kiam la reĝo Yao volis rezigni la tronon al Xu You, li diris al tiu: “Se ni lasas la torĉojn neestingitaj tiam, kiam la suno aŭ la luno brilas, ĉu ne estas malfacile vidi ilin lumantaj? Se oni ankoraŭ daŭrigas la irigaciadon de la kampoj tiam, kiam ĝustatempa pluvo falas, ĉu tio ne estas malŝparo de laboro? Se vi, majstro, eksidus sur la trono, la tuta imperio certe estus en bona ordo; kaj tamen mi nun ankoraŭ vane okupas la lokon. Konsiderante min netaŭga por tio, mi nun permesas al mi transdoni al vi la regadon de la imperio.”

Xu You respondis: “De kiam vi eksidis sur la trono, la tuta imperio ĉiam estas en bona ordo. Se mi prenus vian lokon, ĉu mi tiam ne farus tion por la renomo? La renomo estas nur la ombro de realaĵo, ĉu do vi volas, ke mi estu la ombro? La troglodito, kiu konstruas sian neston en la profunda arbaro, okupas nur unu branĉon. La talpo, kiu trinkas el la rivero, prenas nur stomakon da akvo. Reiru, via majesto, kaj forgesu tion. Mi havas nenian bezonon pri la imperio. Eĉ se la kuiristo malzorgas siajn devojn, la pastro ĉe ofera ceremonio ja ne povas forlasi sian okupon kaj fari la kuiradon anstataŭ li.”

§01-03

Jianwu petis konsilon de Lianshu, dirante: “Mi aŭdis de Jieyu bombastajn parolojn, kiuj estis tre impresaj kaj tamen nekredeblaj aŭ nepravigeblaj. Ĉiufoje, kiam li ekparolis, lia tede longa parolado neniam tuŝis la temon. Mi estis konfuzita kaj konsternita de liaj vortoj. Tiel senlimaj, kiel la Lakta Vojo, ili estis tre neverŝajnaj kaj senprudentaj.”

“Kion li diris?” demandis Lianshu.

“Li diris,” respondis Jianwu, “ke ‘sur la malproksima monto Miaoguye vivas supernatura viro. Liaj manieroj estas elegantaj kaj graciaj, kiel tiuj de aminda virgulino. Li manĝas nenian grenon, sed enspiras venton kaj trinkas roson, rajdas sur nuboj, jungas la flugantajn drakojn, kaj tiele migradas trans la kvar maroj. Per la koncentro de sia spirita povo li protektas la estaĵojn kontraŭ la plagoj kaj certigas riĉan rikolton.’ Mi pensas, ke ĉiuj liaj diroj estas ridinde sensencaj kaj tute nekredeblaj.”

“Prave vi diras,” diris Lianshu. “Ni ne povas dividi kun la blindulo la aprezon de la belaj koloraj desegnaĵoj, nek kun la surdulo de la muziko de sonoriloj kaj tamburoj. Ekzistas blindeco kaj surdeco ne nur fizikaj, sed ankaŭ la mensaj — tiuj ĉi vortoj estas aplikataj ĝuste al vi! Tiu ĉi sankta viro, kun siaj virtoj, povas kunfandiĝi kun ĉio sub la ĉielo en unu tuton. Kiam ĉiuj homoj en la mondo atendas, ke li regu super la mondo, kiel do li povus volonte sin okupi pri tiaj mondaj aferoj vulgaraj? Nenio povus malutili al tiu ĉi sankta viro, nek inundego povus lin dronigi. Eĉ en la sekegeco, kiu povus fandi metalojn kaj bruligi montojn, li ne sentus la varmon. Kaj eĉ el la polvo kaj brano, kiujn li forlasis, povis esti knede mulditaj saĝaj reĝoj kiel Yao kaj Shun. Kiel do li povus volonte sin okupi pri tiaj mondaj aferoj vulgaraj?”

Iu el la regno Song portis kelkajn ceremoniajn ĉapojn al la regno Yue por vendado. Sed la viroj el la regno Yue kutimis fortondi sian hararon kaj tatui sian korpon, tial ili ne bezonas tiajn objektojn.

La reĝo Yao regis super la popolo de sia lando kaj sukcese konservis perfektan ordon interne de la kvar maroj. Reveninte post sia vizito al la Kvar Saĝuloj sur la monto Miaoguye norde de Fen-rivero, li forgesis en silento sian imperion.

§01-04

Huizi diris al Zhuangzi: “La princo de la regno Wei donacis al mi kelkajn semojn de granda lagenario. Mi plantis ilin, kaj ili portis fruktojn tiel grandajn, kiel la mezuro de kvin *dan*-oj da greno. Uzate kiel vazoj por enteni likvon, ili ne estus sufiĉe fortikaj por enteni akvon aŭ supon. Se ili estus tranĉe duonigitaj, ili estus tro grandaj por esti uzataj kiel kuleregoj. Vere grandaj ili estis! Sed mi ne sciis kiel ilin uzi, mi do ilin disrompis.”

Zhuangzi diris: “Vi certe ne estas lerta en la uzado de grandaj objektoj. En la regno Song vivis iu homo, kiu inventis ungventon kontraŭ manohaŭta fendetiĝo. Dum generacioj lia familio sin okupis pri la silkolavado. Iu aliregnano aŭdis pri la ungvento kaj proponis prezon de cent pecoj da oro por la recepto. La Song-regnano kolektis siajn familianojn kaj diris: ‘Dum generacioj ni faras silkolavadon

kaj perlaboras nur kelkajn pecojn da oro. Nun ke en unu mateno ni povos akiri pecojn da oro per forvendo de la recepto, mi proponas, ke ni vendu ĝin al li.'

"La aliregnano akiris la recepton kaj prezentis ĝin al la princo de la regno Wu, kiu tiam militis kontraŭ la regno Yue. La princo de la regno Wu faris lin komandanto de la militŝiparo. En la vintro li kondukis surakvan batalon kontraŭ la regno Yue kaj disvenkis ĝian armeon, kaj pro tio li estis rekompencita per parto de la okupita teritorio kiel feŭdo kaj ricevis titolon.

"La sama restis la efikeco de la recepto kontraŭ manohaŭta fendetiĝo, tamen per ĝi unu ricevis feŭdulan titolon, dum la aliaj, ĝin posedante, ĉiam restis silkolavantoj. Tio fariĝis ĝuste pro tio, ke ili uzis ĝin en malsamaj manieroj. Nun ke vi havus tiajn kolosajn botelkukurbojn, kial vi ne ligus ilin al vi ĉirkaŭ la talio kiel buojn dum via flosado sur la rivero aŭ lago, anstataŭ esti maltrankvila pri ilia trograndeco kaj senutileco? Ŝajnas al mi, ke via menso ankoraŭ ne estas sufiĉe lumigita."

Huizi diris al Zhuangzi: "Mi havas grandan arbon, kiun oni nomas ailanto. Ĝia trunko estas tiel tuberplena, ke la ĉarpentisto apenaŭ povas apliki sian ŝnurliniilon al ĝi; ĝiaj branĉoj estas tordaj kaj neregulaj, ke ortilo apenaŭ povas esti uzata al ili. Ĝi staras sur la vojflanko, sed neniu ĉarpentisto volas ĵeti al ĝi eĉ unu rigardon. Nun viaj paroloj estas kiel mia arbo — tiel grandaj kaj senutilaj, ke neniu volas ilin aŭskulti."

Zhuangzi diris: "Ĉu vi neniam vidis sovaĝan katon aŭ sibirikan mustelon? Ĝi kaŭras aŭ kuŝas sur la tero atendante sian predon. Orienten kaj okcidenten ĝi saltadas, evitante nenion altan, nek malaltan, ĝis ĝi estas kaptita en kaptilo aŭ mortas en reto. Koncerne la gruntbovon, kiu estas tiel granda, kiel nuboj pendantaj de la ĉielo. Ĝi, kvankam granda, ne povas kapti ratojn, nek musojn. Nun vi havas grandan arbon, sed vi estas maltrankvila pri ĝia senutileco. Kial vi ne plantas ĝin en la lando de la nenieco aŭ en vasta sovaĝejo? Flanke de ĝi vi povos plezure promenadi aŭ sub ĝi senzorge dormi. Neniu fraptranĉos ĝin per hakilo aŭ faros al ĝi malutilon. Kvankam senutila, ĝi tamen povas esti libera de ĉia malfeliĉo aŭ sufero!"




Esperantigis



Wang Chongfang (Ĉinujo)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbujo)



Resaniĝo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Nek jaroj
nek longaj tagoj
pasis rapide, kara.
Gravas komunaj agoj.
Propras reagoj..

Ĝis revid'!
Vivu amikec'!
Homon oni estimas
pro solidarec'
kaj bonkorec'.

Bela vort'!
Aŭdiĝas ploroj
pro vekiĝintaj koroj.
Koloriĝas taghoroj
pro bonhumoroj.

Nova fort'
de amosuport'.
Ĉielo blue klaras.
Ĝoja pepado el kort'
kontraŭ nigra sort'.

Espero
kiel lulkanto
milde karesas koron..
Vivu resaniĝanto!
kara amanto!



Vivoleciono

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Venteto
milda kareso,
sekretas je oreloj.
Aŭtomata permeso.
Fajna promeso.

Parolo
pense dirita,
konversaci` lakena.,
pro vorto kovrita.
kredo perdita.

Paroli
ĉu kun flameco
aŭ impete murmuri.
Nur gravegas boneco
kaj bonintenco.

Perfido
Antaŭ la lango
eklaboru la cerbo.
Klaĉo buĉas sen sango.
Frapo del`vango.

Diri ne
al ĉio duba.
Restu fidela amik`.
Fortuno iam nuba
ŝanĝo tre kruda.



Yanke (Ĉinujo)

Vintro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

I.

jam ploras
arboj en vento
tutnudaj ili skuas
korpon pri malkontento
kun tristlamento

II.

sunlumo
suplas pro laco
ĝi volas ripozeti
kuŝas rande de placo
por iom paco

III.

hompaŝoj
haste tra tero
malseka revenas al

varma brila karcero
sen frid-severo

IV.

birdetoj
silentas treme
kaŭrante sur tegmento
kelkaj sin puŝas preme
pepadas ĝeme



**Sopir-al-sudo: ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

Mandio (Ĉinujo)

Skribe al Mia Filo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*
fil'
lernas fremdlande por bril'
estonta
mi jen per babil'

kun
vi volas je aĝ-aŭtun'
pri mia
esper' al vi nun

per
pli grandanima sincer'
lernu de
homa bona kler'

vi
bonkondutu kun konsci'
neniel
perversu sen sci'

pri
de vi lernata meti'
perfektu
jen kun energi'



**Dekses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa (x=senrima)*

A. Ĉeĥov (1860-1904)*



Historio de unu venda entrepreno

Andreo Andrejeviĉ Sidorov heredis de sia patrino kvar mil rublojn kaj decidis per tiu mono establi libran vendejon. Tian vendejon oni tre bezonas. Urbo dronis en malklereco kaj superstiĉoj, maljunuloj nur vizitadis banejon, oficistoj ludis kartojn kaj drinkis vodkon, sinjorinoj klaĉis, junularo vivis sen idealoj, fraŭlinoj en tuta tago revis pri geedziĝo kaj manĝis fagopiran kaĉon, edzoj batis siajn edzinojn, laŭ stratoj porkoj vagis.

"Socio bezonas ideojn, pli multe ideojn! – Andreo Andrejeviĉ pensis. – Ideojn!"

Luinte ejon por vendejo li veturis al

Moskvo kaj veturigis de tie multe librojn de malnovaj kaj plej novaj aŭtoroj kaj multe lernolibrojn. Li dismetis ĉi ĉiujn librojn laŭ bretoj. Dum unuaj trj semajnoj aĉetantoj tute ne venis. Andreo Andrejeviĉ sidis apud vendotablo, legis libron de Miĥajlovskij[1] kaj penis ĝuste pensi. Kiam al li neatendinte venis penson, ke ekzemple nun bone manĝus bramon kun kaĉo, do li tuj haltis sin: "Aĥ, kiel tio estas vulgare!" Ĉiu tago matene en vendejon rapidege enkuris frostita junulino vestinta sin per kaptuko kaj galoŝoj sur nudaj piedoj kaj parolis:

− Donu vinagron je du kopekoj!

Kaj Andreo Andrejeviĉ kun malestimo respondis al ŝi:

− Vi miksis pordon, fraŭlino!

Kiam al li venis iu amikoj, do li farinte seriozan kaj sekretecan vizaĝon prenis de plej malproksima breto trian volumon de Pisarev[2], forblovis de ĝi polvon kaj kun tia mieno, kvazaŭ en vendejo li havas ankoraŭ ion, sed li timas montri, parolis:

− Jes, amiko… Tia libro, mi diras al vi, estas tia… Jes… Ĉi tie, amiko, unuvorte, estas tio, ke se oni tion tralegos, do tre miros… Jes.

− Gardu sin, amiko. Vi povas havi malagrablecojn!

Post tri semajno unua aĉetanto venis. Li estis dika grizhara sinjoro kun vangharoj, vestinta sin per kasketo kun ruĝa rando. Laŭ tuta videbleco li estis bienulo. Li postulis duan parton de revuo "Patrovorto".

− Ĉu vi havas grifelojn? – li demandis.

− Mi ne havas.

− Malbone… Domaĝe. Mi ne volas pro tia bagatelo veturi al bazaro…

"Efektive senpripense mi ne havas grifelojn, − Andreo Andrejeviĉ pensis post foriro de la aĉetanto. − Ĉi tie en provinco mi ne devas mallarĝe specialiĝi. Mi devas vendi ĉion, kio rilatas al klerigo kaj tiel aŭ aliel kontribuas ĝin."

Li skribis al Moskvo, kaj eĉ monato ne pasis, jam en fenestro de lia vendejo estis plumoj, krajonoj, lernantaj kajeroj, nigraj tabuloj kaj alia lerna ilaro. Al li komencis malofte veni knaboj kaj knabinoj. Eĉ estis tia tago, kiam li perlaboris unu rublon kaj kvardek kopekojn. Foje al li enkuris la junulino vestinta sin per ledaj galoŝoj. Li jam malfermis buŝon, por ke diri al ŝi, ke ŝi miksis pordon, sed ŝi elkriis:

− Donu paperon je unu kopeko kaj markon je sep kopekoj!

Post tio Andreo Andrejeviĉ komencis havi poŝtajn markojn kaj samtempe kambian paperon. Post ok monatoj (se oni kalkulas de establo de vendejo) al li venis unu sinjorino, por ke aĉeti plumojn.

− Ĉu vi havas gimnaziajn tornistrojn?

− Ve, sinjorino, mi ne havas.

− Aĥ, kia estas domaĝo! Laŭ tia okazo montru al mi pupojn, sed nur pli malmultekoste.

− Sinjorino, pupojn mi ankaŭ ne havas! – Andreo Andrejeviĉ malgaje diris.

Ne longe pensante li skribis al Moskvo, kaj baldaŭ en lia vendejo aperis tornistroj, pupoj, tamburoj, sabroj, harmonikoj, pilkoj kaj diversaj ludiloj.

− Tio estas bagateloj! – li parolis al siaj amikoj. – Jen atendu, mi havos lernan materialon kaj raciajn ludojn! Ĉe mi, komprenu, eduka parto bazos sin, kiel oni diras, sur delikataj konkludoj de scienco, unuvorte…



Ilustraĵo de la tradukinto

Li mendis halterojn, kroketon, triktrakon, infanan bilardon, ĝardenajn ilojn por infanoj kaj du dekojn de tre saĝaj, raciaj ludoj. Poste loĝantoj pasante preter lia vendejo al granda sia plezuro ekvidis du biciklojn: unu la granda, alia la pli malgranda. Vendo iĝis tre bona. Aparte bona vendo estis antaŭ Kristnasko, kiam Andreo Andrejeviĉ elpendigis afiŝon, ke li vendas ornamaĵojn por novjara arbo.

− Mi al oni aldonos higienon, komprenu, − li parolis al siaj amikoj frotante manojn. − Mi nur en Moskvon veturos! Mi havos tiajn filtrilojn kaj diversajn sciencajn perfektigojn, ke vi frenezigôs, unuvorte. Oni, amiko, ne devas ignori sciencon. Ne-e!

Perlaborinte multan monon li veturis al Moskvo kaj tie aĉetis diversajn varojn je kvin mil rubloj, per kontanto kaj per kredito. Tio estis kaj filtriloj, kaj bonegaj lampoj por skribtabloj, kaj higienaj kalsonoj por infanoj, kaj cicumoj, kaj monujoj, kaj zoologiaj kolektoj. Samtempe li aĉetis per kvincent rubloj bonegan vazaron kaj ĝojis ke aĉetis, ĉar belaj aĵoj evoluigas delikatan guston kaj mildigas morojn. Kiam li revenis el Moskvo, li komencis dismeti novan varon laŭ bretaj kaj bretaroj. Kaj iel okazis, ke, kiam li grimpis por ke ordigi supran breton, okazis ia skuo, kaj dek volumoj de Miĥajlovskij unu post la alia falis de breto. Unu volumo batis lian kapon, la ceteraj falis malsupren rekte sur lampojn kaj rompis du lampajn globojn.

− Kiel tamen oni… dike verkas! − Andreo Andrejeviĉ murmuris gratante sin.

Li kolektis ĉiujn librojn, forte kunligis ilin per ŝnuro kaj formetis sub vendotablon. Post du tago post tio oni informis al li, ke oni kondamnis najbaron-manĝovariston al arestitaj rotoj[3] pro turmento kontraŭ nevo, kaj ke oni luigas butikon. Andreo Andrejeviĉ tre ekĝojis kaj luis la butikon por si. Baldaŭ en muro oni faris pordon, kaj ambaŭ butikoj kunigitaj kiel la unu estis plenŝtopita per varo. Ĉar aĉetantoj, kiuj venis en dua duono de butiko, laŭ kutimo petis teon, sukeron kaj kerosenon, do Andreo Andrejeviĉ ne longe pensante ekhavis ankaŭ manĝovaron.

Nun li estas unu el plej riĉaj komercistoj en nia urbo. Li vendas vazaron, tabakon, gudron, sapon, kringojn, ŝtofojn, galanterion, drogon, fusilojn, ledojn kaj porkfemurojn. Li luis en bazaro vinkelon kaj, oni parolas, volas establi familiajn banejojn kun ĉambroj. Sed librojn, kiuj iam estis sur bretoj, en tiu kvanto trian volumon de Pisarev li delonge vendis per 1 rublo 5 kopekoj je pudo.

En nomfestoj kaj en geedziĝaj festoj antaŭaj amikoj, kiujn Andreo Andrejeviĉ moke nomas "usonanoj", iufoje komencas kun li interparolon pri progreso, pri literaturo kaj pri aliaj altaj temoj.

− Ĉu vi legis, Andreo Andrejeviĉ, lastan libron de "Informilo de Eŭropo"? − oni demandas al li.

− Ne, mi ne legis… − li respondas duonfermante okulojn kaj ludante oran ĉenon. − Tio ne tuŝas min. Mi okupas sin pri pli bona afero.



Notoj:

** Anton Pavloviĉ Ĉeĥov (1860 -1904) estas fama rusa verkisto kaj dramaturgo.*

1. *Miĥajlovskij (1842-1904) – fama rusa publicisto, sociologo kaj literatura kritikisto*
2. *Pisarev (1840-1868) – fama rusa publicisto, literatura kritikisto, filozofo-materialisto, revolucia demokrato.*
3. *Arestitaj rotoj estas speco de puno en cara Rusio pro malgrandaj kriminalaj kaj politikaj krimoj. En arestitaj rotoj oni kunigis armean reĝimon kun deviga laboro.*

Esperantigis



Igorj Ĥomjakov (Rusio)

Omaĝe al la Jubileo de 125-a datreveno de naskiĝtago de Eroŝenko

Guozhu (Ĉinujo)



Mirinda homo.
Mirinda renkontiĝo.
Mirinda priskribo

—— Esploro pri la Intervidiĝo de Eroŝenko kun Li Hongzhang



* 01

Pri Eroŝenko duboj tre abundas.
Blindeco lin en kvar-jaraĝo vundas.

Vasilij Eroŝenko sendube estas mirinda homo kun legenda vivo. Tamen, kiam ni proksimiĝas al li, antaŭ ĉio ni frontas al multaj duboj:

Ĉu li estas rusa poeto, aŭ ukraina?

Ĉu li naskiĝis en 1889, aŭ 1890?

Ĉu li devenas el familio de malriĉa kamparano, aŭ de riĉa bienulo?

Tiuj malsamaj asertoj aperas ĉiuj ne senkaŭze.

Avo kaj patro de Eroŝenko estas ukrainanoj, dum lia patrino estas rusa virino.

Obuhovka, la naskiĝloko de Eroŝenko, estas vilaĝo fondita plej frue de ukrainanoj, tamen nun apartenas al teritorio de Rusio, tial nun oni nomas Eroŝenkon ruso.

Laŭ rusa kalendaro Eroŝenko naskiĝis en 1889-12-31，sed laŭ la Gregoria kalendaro li naskiĝis en 1890-01-12.

Laŭ kristana erao, en 2015 okazos jubileo de la 125-a datreveno de la naskiĝo de Eroŝenko.

Mi ankoraŭ bone memoras ke antaŭ kvin jaroj en 2010 okazis la dua internacia Interret-konferenco *Vasilij Eroŝenko kaj lia tempo.*

La vivo de Eroŝenko komenciĝis per malfeliĉo：4-jara li blindiĝis pro febro de morbilo.

Tre eble la sinteno de homo, kiu se estus trafita de tia missorto, estas vivi iele-trapele，li ne havus nek kuraĝus havi tro pretendan revon.

Tamen la vivo de Eroŝenko estas kun diversaj gustoj, buntaj koloroj, brilaj lumoj, vere enhavorica.

Ek de sia 9-a jaraĝo Eroŝenko komencis lerni en lernejo, kompreneble ne en ordinara lernejo sed en Moskva Lernejo por Blindaj Infanoj. Tie estiĝis la startpunkto de lia lernado. Ĉiu inda vivo certe ne povas disiĝi de dumviva lernado. Poste la scioj, kiujn Eroŝenko akiris, multe superis tion instruatan en klasĉambro.

Eroŝenko ellernis muzikon, masaĝon, oratorarton, verkadon (eĉ en fremdaj lingvoj).

Li posedis multajn lingvojn: pli ol dek eŭropajn, plurajn orientajn, li scipovas la rusan, Esperanton, anglan, latinan, japanan, palion (lingvo speciale por legi budaismajn sutrojn), kaj ankaŭ brajlon ， brajlan stenografion de la angla ……。

* 02

Kvankam kun neniu armilo fera,
oni rigardas lin ofte danĝera.

Esperanto donas netakseble gravan influon por ŝanĝiĝo de la vivo de Eroŝenko. Post kontakto kun Esperanto, certe okazas ŝanĝoj en vivo de ordinara homo. La vivo fariĝas ne plu banala, cetere Eroŝenko origine estis neordinara. Li lernis en la blindula lernejo sume naŭ jarojn dum 1899-1908. Post diplomiĝo, Eroŝenko aliĝis al blindula orkestro de granda restoracio en Moskvo（Jagor-restoracio）kiel violonisto. Tiam li interkonatiĝis kun Anna Ŝarapova (1863-1923), kiu estis bofratino de Pavel

Birjukov, disĉiplo kaj biografo de Lev Tolstoj. Anna Ŝarapova estis instruistino de angla lingvo, fervora disvastiganto de Esperanto. Ŝi instruis al Eroŝenko Esperanton kaj anglan lingvon. Tiel, 18-jara Eroŝenko ellernis (en 1908) Esperanton. En 1912 Eroŝenko vojaĝis al Anglio kaj eklernis en la Normala Reĝa Kolegio por Blinduloj.

Eroŝenko estis sufiĉe inteligenta. Post nelonga lernado sub instruado de Anna Ŝarapova, Eroŝenko jam povis paroli tre flue en Esperanto. Prononco de Eroŝenko estas unuaranga, poste li gajnis la unuarangan premion de plej bona Esperanta prononco en la 15-a Universala Kongreso de Esperanto (1923-07，Nürenbergo Germanio）.

Ekde 1914, Eroŝenko vojaĝis tra multaj landoj： Siamo(Tajlando), Birmo, Hindio, Japanio, Ĉinio. En Rusio li vojaĝis tra Siberio, Turkestano, Uzbekio，per glacirompa ŝipo li vojaĝis al arkta tundro. Sidante sur sledo tirata de hundoj li ĉasis (kvankam liaj okuloj ne vidis, tamen li povis distingi direktojn per aŭdo). Foje li renkontis lavangon kaj devis resti en glacia mondo malproksima je 70 kilometroj disde lia loĝejo. Tiam unu hundo savis lian vivon, kondukinte lin reveni al sekura loko. Tiu travivaĵo vekis ĉe li kimeran revon, ke li deziras piediri kun tirata hundo ekde sia hejmvilaĝo tra tuta Rusio al Vladivostoko en malproksima oriento. Sed tiu deziro ne realiĝis poste.

En sia eseo *La Unua Vojaĝo Fremdlanden* Eroŝenko tiel skribis:

“Eĉ la magia lampo de Aladin, ne povas doni al mi pli grandan helpon ol kiom eta verda stelo de Esp-isto al mi donis. Mi povas tiel aserti, ke inter la eminentuloj de arabaj mirrakontoj neniu povas fari por mi pli multe ol D-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, la eminentulo en reala vivo.”

Eroŝenko donis diversajn malsamajn impresojn al publiko. Liaj amikoj bonvenigis lin. Sed la aŭtoritatoj ĉiam sentis maltrankvilon pri tiu blindulo, kiu havas nenian feran armilon en siaj manoj, kaj ofte rigardis lin danĝera ulo:

En Hindio Eroŝenko estis rigardata spiono de Germanio kaj suferis areston.

En Japanio oni rigardis lin sekreta agento de Sovetio kaj forpelis lin eksteren.

En Ĉinio Eroŝenko estis rigardata radikala anarkiisto.

En Sovetio, pro tio ke li scipovis Esperanton kaj estis sendependa en menso kaj ago, li troviĝis ĉiam sub kontrolo de KGB (la komitato de Ŝtata Sekureco). Liaj poŝtaĵoj estis malfermitaj, arkivo ruinigita, kaj oni eksigis lin de la posteno de lerneja estro ……

Amikoj nomis lin japana poeto, kaj li ĉeestis UK (1922) kiel reprezentanto de Ĉinio.

* 03

Du jarojn loĝis en hejmo de Lusin,
por ĉina E-movad' laŭ antaŭdestin'.

Eroŝenko havis profundan intiman rilaton kun ĉina Esperanto-movado laŭ antaŭdestino.

En majo de 1921 Eroŝenko estis forpelita el Japanio far japana registaro. Lia kulpo estis propagandi socialismon kaj partopreno en mitingoj en “la Unua de Majo”. Samjare en oktobro Eroŝenko post zigzaga vojaĝo venis al Ŝanhajo. La unua ĉino, kiu bonvenigas lin, estis Hujucz (1897-1986). Eroŝenko verkis kion li vidis kaj pensis en Ŝanhajo en fabelan skizon *Rakontoj de Velkinta Folio*. Hujucz ĉinigis tion kaj publikigis.

La 24-an de februaro 1922 Eroŝenko venis de Ŝanhajo al Pekino. Rekomendite de Lusin (1881-1936), Eroŝenko estis engaĝita de Cai Yuanpei (1868-1940), la rektoro de Pekina Universitato, kiel docento, li instruis en la universitato Esperanton kaj rusan literaturon. Dum sia restado en Pekino, Eroŝenko loĝis en la domo sur strato Badaowan n-ro 11, kie estis la hejmo de s-ro Lusin kaj ties pli juna frato Zhou Zuoren (1885-1967). Eroŝenko fariĝis tre intima amiko de la du fratoj Zhou. Tiam

Zhou Zuoren funkciis preskaŭ kiel la privata sekretario, vojgvidanto kaj interpretisto de Eroŝenko. Zhou Zuoren fidele servis lin en ricevo de salajro, interŝanĝo de monoj, skribo de leteroj, registro de prelegoj, sendo de telegramoj, akompanado kaj interpretado, akompanado en ekskursoj, festenoj ks.

En la 23-a de majo 1923, fondiĝis Pekina Esperanto-Asocio (PEA). Oni elektis s-ron Zhou Zuoren prezidanto kaj Eroŝenkon sekretario de PEA. Postrestis al ni tre fama kunfoto de 16 personoj ĉe la domo en Badaowan. Ĉar poste okazis malpaciĝo inter la du fratoj Zhou. Ili ne plu kune aperis en kunfoto escepte nur dufoje sur foto kun esperantistoj.

Eroŝenko donis prelegojn en pluraj altlernejoj en Pekino. Tiuj, kiuj interpretis por li, estis Zhou Zuoren (el Esperanto), Hu Shi （1891-1962, el la angla lingvo）kaj s-ro Geng Mianzhi(1899-1947). Kiam Eroŝenko loĝis en Badaowan, japanaj sekretaj policanoj embuskis ĉe la enirejo de la strateto por gvati lian agadon. Kiam lokaj policanoj venis ĝeni, Zhou Zuoren donis garantion por Eroŝenko. Neimageble, ke pri la preciza tempo kiam Eroŝenko foriris de Pekino al Eŭropo (1923-04-16 ptm), nun ni legas de la telegramo “n-ro SP 1351” sendita de la japana sekreta polico. En somero de 1922, Eroŝenko vojaĝis al Finnlando por ĉeesti la 14-an Universalan Kongreson de Esperanto. Pro tio, ke li revenis al Pekino malpli frue je 4 tagoj ol la planita tagordo (forvojaĝis de Pekino en 1922-07-03, revenis en 1922-11-04), la fratoj Zhou ambaŭ sentis maltrankvilon. S-ro Lusin verkis la novelon *La Komedio de la Anasoj* kaj Zhou Zuoren verkis por li sinsekve tri artikolojn (poste estis kolektitaj sub komuna titolo S-ro Eroŝenko kaj Guozhu faris esp-igon) . Zhou Zuoren publikigis tion en ĵurnalo de Pekino. Samjare en vintro, Li Dazhao(1889-1927) skribis leteron al Zhou Zuoren, kun propono ke en la vintra ferio ili kun Eroŝenko kune vizitu al urbo Wuhan ĉeesti simpozion laŭ invito de Hu Xiaoshi(1888-1962).

* 04

Pri Li Hongzhang lia skribo ĥimera
impresas al legantoj tamen vera.

Ekde 1916 Eroŝenko komencis publikigi verkaĵojn. Li verkis fabelojn, fablojn, dramojn, prozaĵojn kaj poemojn, ĉefe en la japana lingvo kaj Esperanto. Liaj verkaĵoj estis tradukitaj en diversajn lingvojn. Sed li tre malofte verkis pri sia propra travivaĵo. Nur unu peco en Esperanto kun titolo *Unu Paĝeto en Mia Lerneja Vivo*, verŝajne verkita en 1921. Hujucz ĉinigis tion kaj publikigis en *Fabelaro de Eroŝenko* eldonita en 1923. La titolo de la ĉinigo estas *Fragmento el Mia Lerneja Vivo* --- *Membiografio* de kiu ni povas imagi ke la tradukinto ankaŭ kredas ke tio estas rememoro de la aŭtoro pri sia infanaĝa travivaĵo.

En tiu ĉi verkaĵo Eroŝenko diris ke foje s-ro Perlov, la rusa te-komercisto, invitis Li Hongzhang（1823-1901）, la faman diplomaton de Ĉinio, gasti al lia domo. Informiĝinte ke la lernejo por blindaj infanoj troviĝas najbare de la domo de Perlov, Li Honzhang persiste petis viziti al la blindul-lernejo. Kaj tiel Eroŝenko ne nur renkontis (ne vide) sed eĉ mane palpis s-ron Li Hongzhang.

Post kiam la gasto foriris de la blindullernejo, Eroŝenko kaj lia kunlernanto Lapin elmetis demandojn al instruistoj：En ordinaraj tagoj vi ĉiam instruas al ni ke la orientuloj estas malsaĝaj, malinteligentaj kaj malcivilizaciaj, tamen ni havas tute malsaman impreson de la ĵusa renkontiĝo. Kial okazis tio? Tiaj demandoj forte kolerigis la instruistojn. Eroŝenko kaj Lapin ambaŭ estis punataj per malpermeso de vespermanĝo. La puno finiĝis nur ĝis tiam kiam ili konfesis sian eraron kaj faris severajn kalumniojn al Li Hongzhang.

La artikolo estis verkita en la unua persono, kun multaj veraj personaj nomoj, lokaj nomoj

kaj emocia intrigo en viveca priskribo, tial multaj legantoj kredas tion vera okazintaĵo.

* 05

Julija vizitas Moskvon kun fervoro,

sed ŝi suspekton sentas post esploro.

En Ukraino vivas esperantistino Patnanj Julija, kiu dum multaj jaroj okupas sin speciale per la studo pri Eroŝenko. Stilo de esploro far Julija estas serioza kun realisma spirito. La verkaĵo *Unu Paĝeto en Mia Lerneja Vivo* de Eroŝenko tre interesas Julija-n. Pro la granda interesiĝo Julija volas fari pli detalan esploradon. Julija do speciale vizitis al la Blindul-lernejo en Moskvo （adreso：1. Mesĉanskaja, 11 ）kaj trovis ke la lernejo estas vere proksima de la domo de la te-komercisto s-ro Perlov（adreso：1. Mesĉanskaja, 5）. Julija zorgeme legis koncernan arkivon pri la lernado de Eroŝenko en la blindul-lernejo. Tamen, en la nomlisto de tiuj famuloj kiuj vizitis la blindul-lernejon inter la jaroj 1883-1910 ŝi trovis nenion pri la vizito de Li Hongzhang al la nomita lernejo. Tio vekis suspekton de Julija. Je la 9-a de marto 2009 Julija sendis leteron al Guozhu pri tiu problemo. Pli frue en 1983 Guozhu faris ĉinigon de *Unu Paĝeto en Mia Lerneja Vivo* de Eroŝenko kaj metis tion en *la Daŭrigan Lernolibron de Esp-o* kompilitan de Guozhu kiel unu lecionon. Siatempe en 1983 Guozhu ankaŭ kredis tion rememoro de Eroŝenko pri lia vera travivaĵo en la blindul-lernejo. Ricevinte la leteron de Julija, Guozhu ankaŭ komencis studi la ĉinlingvajn materialojn, ĉefe pri la vojaĝo al Eŭropo kaj Ameriko kiun Li Hongzhang faris en 1896.

* 06

ĉar Li Hongzhang vojaĝis al Rusio

speciale sendita el Ĉinio.

Li Hongzhang（1823-1901）, lokano de Hefei, Anhui-provinco, Ĉinio, estis la plej potenca kortegano en lastaj jaroj de Qing-dinastio. Ekde 1870 li funkciis kiel la Ĝenerala Gubernatoro de Zhili-provinco kaj samtempe la Kortegano pri komercaj aferoj de la Nordaj Marbordaj Provincoj, kie li regis dum 25 jaroj. Fakte li tenis la potencon pri aferoj diplomatia, milita kaj ekonomia de Qing-dinastio. En la regista rondo li viciĝas je la tria loko nur post la Imperiestra Patrino Cixi (1835-1908) kaj Imperiestro Guangxu (1871-1908). En kaj ekster Ĉinio oni kutime nomas lin honore “Premiero Li”.

Siatempe la historia fono estis jena:

En 1894 okazis mara milito inter Ĉinio kaj Japanio. Ĉinio suferis grandan malvenkon.

Kiel reprezentanto de Ĉinio Li Hongzhang en 1895 subskribis Traktaton de Shimonoseki, laŭ kiu Ĉinio devis cedi teritorion kaj pagi monkompenson al Japanio. Pro tiu malhonoro Li Hongzhang estis rigardata granda krimulo kaj “naciperfidulo”, la Kortego eksigis lin de la oficoj de la Ĝenerala Gubernatoro de Zhili-provinco kaj samtempe la Kortegano pri komercaj aferoj de la Nordaj Marbordaj Provincoj. Tiam en Ĉinio furoris fama versparo ke

Post mort' la burleskulo Yang ludos ne plua.

Nacion perfidas Sinjoro Li la Dua.

En februaro de 1896, por gratuli la kronadon de la rusa caro Nikolao II kaj ankaŭ por “alianci Rusion por rezisti kontraŭ Japanio”, Li Hongzhang estis nomumita kiel speciala sendito de la Kortego de Qing-dinastio kaj faris rondvojaĝon tra ok landoj de Eŭropo kaj Ameriko. Tiel Li Hongzhang fariĝis la unua speciala diplomata sendito inter korteganoj de Qing-dinastio, kiu faris rondvojaĝon tra la mondo.

Nikolao II estis la lasta caro de Rusio. Kiam li ankoraŭ estis kronprinco, li iam vizitis al Guangdong-provinco de Ĉinio. Tiam lin akceptis Wang Zhichun, la loka mandareno pri financa kaj civila aferoj de Guangdong-provinco. La unua plano de la Kortego de Qing-dinastio ja estis komisii s-ron Wang Zhichun vojaĝi al Rusio, tamen

Rusio opiniis ke la rango de Wang Zhichun estis ne sufiĉe alta, tial poste la Kortego decidis komisii s-ron Li Hongzhang kun pli supera rango viziti Rusion.

* 07

Tang-poemo iĝis Himno Nacia.
Furoras la novaĵo sensacia.

En 1896, kiam Li Hongzhang faris rondvojaĝon tra la mondo, mankis al Ĉinio eĉ nacia flago kaj nacia himno. Tio kaŭzis maloportunaĵojn okaze de la ceremonio de bonvenigo aranĝita de la fremdaj registaroj. Li Hongzhang do ordonis al sia sekvantaro ke ili ellaboru unu nacian himnon per antikva muzikaĵo kun adaptita teksto. Tiun taskon oni plenumis. La elektita teksto fakte estis unu Tang-poemo versita de Wang Jian (ĉ.767 - ĉ.830). Pro tio ke la kanto estis iniciatita de Li Hongzhag, oni nomas ĝin Himno de Premiero Li:

Imponas palaco en ora helo.
Jada lotuso sur fea manplato.
Imperiestro kultas al ĉielo.
Ses drakoj tiras ĉaron en sonato.

Ĉie, kie Li Hongzhang alvenis, leviĝis diplomatia vortico kaj furoro pri Ĉinio. Ĉie, kie Li Hongzhang vizitis, li estis tiel varme bonvenigata de la publiko supre inkluzive de princoj, altrangaj korteganoj kaj malsupre de ordinaraj popolanoj, ke la stratoj estis plenigitaj de amasoj da bonvenigantoj. Ankaŭ ĵurnalistoj sekvis liajn spurojn raporti, tiel ke la vizito de Li Hongzhang fariĝis fokuso de novaĵoj kaj plej furora temo.

La 18-an de majo 1896, Li Hongzhang, la speciala diplomato-sendito de Ĉinio, venis al Moskvo, la malnova ĉefurbo de Rusio. Laŭ raportaĵo de usona ĵurnalisto, inter la diverslandaj honorindaj gastoj kiuj venis por ĉeesti la ceremonion de la cara kronado, Li Hongzhang ricevis la plej varman bonvenigon, kies pompa sceno estis nur iom malpli luksa ol la soleno de eniro tra urba pordo far la caraj geedzoj, la vera ĉefrolulo de la tuta kronado. Kaj Li Hongzhang estis preskaŭ unika persono inter la gastoj, kiu ne estis membro de cara aŭ reĝa familio.

* 08

Dum monda rondvizito al ok landoj,
sen tuŝ' al ter' japana liaj plandoj.

En 1896 (la 22-a jaro de Guang'xu-erao, Qing-dinastio) kiel la speciala sendito de Ĉinio, Li Hongzhang laŭ invito veturis al Rusio por ĉeesti la solenan kronadon de la caro Nikolao II, samtempe li ankaŭ vizitis al aliaj sep landoj Germanio, Nederlando, Francio, Belgio, Anglio, Usono kaj Kanado. Lia delegacio konsistis el 43 membroj, el kiuj kvin estis fremdulo-sekretarioj.

Antaŭ du jaroj en 1894 okazis la mara milito inter Ĉinio kaj Japanio. Ĉinio suferis grandan malvenkon. Laŭ ordono de Kortego Li Hongzhang veturis al Japanio fari traktadon pri repaciĝo. La intertraktado iris en la Domo Printempa Velo kaj Li Hongzhang suferis pafvundon far japana asasinisto. Fine estis subskribita la Traktato de Shimonoseki, laŭ kiu Ĉinio devis cedi al Japanio siajn teritoriojn Taiwan, Penghu, Liaodong-duoninsulon kaj pagi monkompenson je la sumo de 200,000,000 taeloj da arĝento. Tiel Li Hongzhang estis rigardata de ĉina publiko kiel naciperfidulo. Laŭ onidiro, post subskribo de la Traktato de Shimonoseki Li Hongzhang donis ĵuron ke “li neniam plu tuŝu la teron de Japanio dum sia tuta vivo”. Dum sia rondvojaĝo tra la mondo en 1896, ĉie, kie Li Hongzhang alvenis, li estis bonvenigata de lokaj suverenoj. Dum la vojaĝo revena al Ĉinio, li devis ŝanĝi alian ŝipon ĉe japana haveno Jokohamo, Li Hongzhong ordonis ke oni metu pastabulon inter du ŝipoj por lia transiro al la alia ŝipo sen tuŝo al la japana tero. Tiamaniere Li observis la ĵuron kiun li mem donis siatempe.

* 09

Se roluloj ambaŭ en alibio,

la skribo certe nur pri fantazio.

Nun ni kombe ordigi la faktojn.

Pri la tempdaŭro kiam Eroŝenko lernis en la Moskva Lernejo por Blindaj Infanoj Patnanj Julija faris ekzaktan esploron： Vasilij Eroŝenko, el kamparana familio, eklernis tie 15 julie 1899, finis la studadon 15 maje 1908 kaj plu ludis en orkestro.

Dume pri la tempdaŭro kiam Li Hongzhang faris sian rondvojaĝon tra la ok landoj de Eŭropo kaj Ameriko Guozhu ankaŭ havas klarajn respondojn：Li Hongzhang forveturis de Ŝanhajo je 28 marte 1896, kaj li revenis al Tianjin samjare je 3 oktobre. Lia rondvojaĝo daŭris sume 190 tagojn --- pli ol duonjaro. Interalie en la 18-a de majo 1896 okazis sensacia novaĵo. En la majo 1896 okazis la solena kronado por Nikolao II, la lasta caro de Rusio. La celebra soleno daŭris longe dum 20 tagoj kaj okazis eksteratendita akcidento kun gravaj vundoj. Ĉar la juna nova caro decidis ke li venu al la placo Hodunka kaj amuza kunveno estu okazigata tie eĉ kun liaj donacoj. Por propraokule vidi la aspekton de Lia Cara Moŝto kaj por ricevi la donacon de Lia Cara Moŝto, amasiĝis sur la placo multaj homoj. La cara donaco estis papera sako. En la sako estis negranda peco da blanka pano, unu kolbaso, du konfititaj biskvitoj, dek grajnoj da fruktobombonoj, kvin nuksoj, unu emajla trinkvazo “Kronado” kun presita akronime parafo de la literoj el la nomo de la nova caro. Apenaŭ je aŭroro, sur la placo malpli granda ol unu kvadrata versto jam dense kolektiĝis pli ol kvincent miloj da homoj, inter kiuj ne mankis riĉaj komercistoj, nobeloj, eĉ junaj damoj. Laŭ registro, post tagiĝo, kolektiĝis sur tiu malgranda placo “almenaŭ miliono da homoj” . Laŭ priskribo en la arkivo de la eks-Sovetia Ŝtata Arkivejo: “frue ekde la 5-a horo matene, varma vaporo leviĝis de la homaj kapoj tiel dense kvazaŭ dika nebulo, ke oni jam ne povis klare vidi vizaĝojn en proksima distanco; eĉ tiuj homoj ĉe la rando estis kun vizaĝo plena de ŝvito. Tiam la homoj kiuj staras en la amasmezo jam ne povis puŝi sin eksteren. Ekaŭdiĝis ĝemoj de lacaj kaj senfortaj homoj.” “Proksimume je la 6-a horo, kvazaŭ pro ia ordono de demono, la homamasoj komencis tumulti, penante sin liberigi eksteren. Iuj estis subpremaj sub piedoj……” La nombro de vunditoj en tiu ĉi akcidento, laŭ statistiko publikigita de la cara registaro pli poste, estis 1386 mortigitoj pro subtretado kaj interpuŝado. Sed laŭ raporto de multaj ĵurnaloj la nombro pli konforma al realo proksimiĝis al 4500 ĝis 4800 vunditoj, kaj pli ol 3000 homoj suferis gravan vundon, kaj ĉ. 50 miloj da homoj estis kripligitaj! Tiu akcidento skuis Moskvon. Multaj korteganoj de caro estis ŝokitaj. Tamen Li Hongzhang restis aplomba kaj instruis siajn “utilajn spertojn” al tiuj korteganoj kiel dece raporti al la imperiestro pri neatenditaj akcidentoj.

Dum sia tuta vivo Li Hongzhang vizitis Rusion unikfoje nur en 1896. Eroŝenko komencis lerni en Moskvo nur ekde 1899. Do estas absolute neeble ke Eroŝenko povis aperi en Moskvo anticipe je tri jaroj kaj intervidiĝis kun Li Hongzhang. Leĝa termino nomas tion “alibio”.

* 10

Romano ne egalas historion,

imagoj do okupas proporcion.

Verkaĵo pri historio temas pri kio okazis en pasinteco. Romano kaj novelo (precipe historia romano) ankaŭ povas skribi pri kio okazis en pasinteco. Tio estas la komuna trajto de ili. Tamen inter ili ankaŭ ekzistas granda diferenco: Fikcio estas nenial kaj neniam permesata ekzisti en historia verkaĵo, tamen jes en romano aŭ novelo.

Ekzemple, en Ĉinio estas du famaj libroj pri la periodo de 168 ĝis 280 p.K. el kiuj la unua kun titolo *Historio de la Tri Regnoj* dum la

alia kun titolo *Romano pri la Tri Regnoj*. La unua libro estas verkita de historiisto Chen Shou, kiu vizitis multajn lokojn kaj kolektis abunde da materialoj pri kio vere okazis en historio. La dua libro estas verkita de romanisto Luo Guanzhong (kies Esperantigo de Laŭlum aperis 2008 en Pekino). En la romano aperis multaj fikciaj epizodoj elpensitaj de la aŭtoro, ekz-e *Prunti sagojn per ŝipo kun fojnaj soldatoj* aŭ *Fortimigi malamikajn armeojn per malplena urbo* ktp kiuj neniam okazis en realo de historio.

Ekzistas ankaŭ alia speco de rakontoj: "Memkonfeso de la aŭtoro" en la stilo de la unua persono. Ekz-e, en 1913 aperis samtempe en Usono kaj Anglio dika libro je 170 miloj da vortoj, kun titolo *Rememoroj de Li Hongzhang*. Tiu nova libro vekis sensacion en Eŭropo kaj Ameriko. Sed ĝia aŭtoro absolute ne estis Li Hongzhang. Ĝin verkis usona ĵurnalisto William Francis Mannix en usona malliberejo per sia aŭdaca imagkapablo. Similaj epizodoj ne mankas ankaŭ al nia Esperantujo, ekz-e la Antaŭparolo de *La Libro de Amo* kiu vivece rakontis al ni pri la vivoj de Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. La teksto legiĝas tiel serioze ke ni legantoj kredas tion vera.

Unu Paĝeto en Mia Lerneja Vivo de Eroŝenko fakte ankaŭ viciĝas inter tiaj verkaĵoj. En la verkaĵo aperis multaj propraj nomoj de veraj personoj, lokoj kaj eventoj. Tiel la detaloj bilde viviĝis. Estas neeble ke ĉiu leganto (aŭ tradukinto) estas kompetenta fakulo. Tial ni facile miskomprenas la fikcion vera.

* 11

Por pri fipotenco far imperio,
li pruntis stilon de alegorio.

Tia verkaĵo kun okulfrapa fikcio ne malofte vidiĝas eĉ inter la mondfamaj ĉefverkoj. Ekz-e: *La Dia Komedio* de Dante Alighieri (1265-1321)，kiu versis pri vizito far vivanta homo al Purgatorio. Same ankaŭ *Notoj pri Strangaĵoj de Liaozhai* (ĉine: Liao Zhai Zhi Yi) de Pu Songling (1640-1715)，kiu verkis pri tiom da vulpaj feinoj, fantomoj kaj monstroj. La aŭtoroj ja skribis pri reala socio per ĉirkaŭfrazoj.

Per la buŝo de du blindaj infanoj (Eroŝenko kaj lia kunlernanto Lapin) Eroŝenko elmetis sian dubon kaj malaprobon pri la misinstruoj de la blankaj instruistoj. En *Unu paĝeto de mia lerneja vivo* Eroŝenko tiel skribis:

La instruisto diris al ni ke homoj estas dividitaj en la rasoj, la blanka, la flava, la ruĝa, la nigra k. t. p. La plej civilizita kaj plej progresema raso estas la blanka, la malplej civilizitaj estas la nigra kaj la ruĝa.

Lapin ekstaris kaj demandis: "Ĉu ni estas la plej civilizitaj kaj progresemaj pro nia blanka koloro?" Alia knabo staris kaj demandis: "Kiam dum somero oni nigriĝas pro la suno, ĉu oni ankaŭ malciviliziĝas pro tio?"

Post kelkaj minutoj mi demandis al la instruistoj: "Ĉu S-ro Li estas vere flava homo?" La instruistoj diris jes.

"Sed mi ne povas trovi ian diferencon inter la blanka mano kaj la flava."

Lapin aldonis: "Se S-ro Li apartenas al la flava raso, certe li devas esti malpli civilizita ol ni, sed al mi ŝajnas ke li estas almenaŭ pli afabla ol nia Miĥail." (Miĥail estis nia servisto, kiun ni tre malŝatis pro lia malĝentileco.)

Survoje al la manĝejo mi diris mallaŭte, klininte min al Lapin, ke la manoj de l' flava S-ro Li Hongzhang estis pli agrablaj por tuŝi ol la manoj de nia blanka direktoro.

Lapin diris al mi ankaŭ en mallaŭta voĉo, ke li pensas S-ron Li Hongzhang esti ne nur pli afabla ol nia Miĥail, sed ankaŭ pli civilizita ol niaj blankaj instruistoj.

Eroŝenko verkis sincere kaj serioze, kun klara vidpunkto, profunda alegorio. Ĉitie Li Hongzhang funkcias nur kiel ia signo aŭ simbolo. La fakto, ĉu ili vere intervidiĝis en Moskvo, jam estas negrava.

* 12

Li Dazhao skribis invitan leteron,
fortuno malfavoris la aferon.

Eroŝenko venis al Ŝanhajo en 1921. En la februaro de 1922 li venis de Ŝanhajo al Pekino. Tagordo de Eroŝenko dum 1922 en Pekino estis plenplena. Li ne nur instruis Esperanton en la Pekina Universitato, sed ankaŭ ofte prelegis en aliaj altlernejoj en Pekino. Tio faras lin tre fama en Ĉinio. Nun mi trovas manskriban leteron de Li Dazhao(1889-1927). Li Dazhao estis unu el fondintoj de la Ĉina Komunista Partio, tiam funkciis kiel profesoro de la historia fakultato kaj estro de la Biblioteko de la Pekina Universitato.

En la vintro de 1922, Li Dazhao skribis leteron al prof. Zhou Zuoren, kun propono ke ili kune vojaĝu al Wuhan (Wuchang) por ĉeesti simpozion en la vintra ferio laŭ invito de s-ro Hu Xiaoshi (1888-1962). La plena teksto de la letero estas jena:

Al S-ro Zhou Zuoren
sendita de Li Dazhao

Respektata s-ro Qiming: Hieraŭ mi ricevis leteron senditan de s-ro Hu Xiaoshi el WSIL (Wuchang-a Supera Instruista Lernejo). Li informis al mi ke la loka Ligo de Instruistoj intencas okazigi simpozion en venonta vintra ferio. Li petas ke mi transdonu lian inviton al vi kaj s-ro Eroŝenko. Li esperas ke vi ambaŭ kune vojaĝos al Wuchang kaj la invitantoj promesas doni al vi ĉiom da vojaĝpago. Mi mem ankaŭ volas tien vojaĝi. Bonvole nepre akceptu la inviton kaj transdonu la inviton al s-ro Eroŝenko. Mi atendas vian respondon.

S-ro Hu Xiaoshi estis fama klerulo, tiam instruis en Wuchang-a Supera Instruista Lernejo.

Bedaŭrinde, la planita kunvojaĝo de la triopo ial ne realiĝis kaj perdiĝis la ŝanco por Eroŝenko viziti al Wuhan, kiu ankaŭ estas unu el gravaj centroj en la ĉina Esperanto-movado.

☆

Mozaike kunmetante la suprajn paragraf-titolojn ni ricevas suban versaĵon:

Pri Eroŝenko duboj tre abundas.
Blindeco lin en kvar-jaraĝo vundas.
Kvankam kun neniu armilo fera,
oni rigardas lin ofte danĝera.

Du jarojn loĝis en hejmo de Lusin,
por ĉina E-movad' laŭ antaŭdestin'.
Pri Li Hongzhang lia skribo ĥimera
impresas al legantoj tamen vera.

Julija vizitas Moskvon kun fervoro,
sed ŝi suspekton sentas post esploro,
ĉar Li Hongzhang vojaĝis al Rusio
speciale sendita el Ĉinio.

Tang-poemo iĝis Himno Nacia.
Furoras la novaĵo sensacia.
Dum monda rondvizito al ok landoj,
sen tuŝ' al ter' japana liaj plandoj.

Se roluloj ambaŭ en alibio,
la skribo certe nur pri fantazio.
Romano ne egalas historion,
imagoj do okupas proporcion.

Por pri fipotenco far imperio,
li pruntis stilon de alegorio.
Li Dazhao skribis invitan leteron,
fortuno malfavoris la aferon.

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_
Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
Chongqing, 400020, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ
http://gazetejo.org/eo/penseo
_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_